

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2012

Ĵaŭdon la 29an de marto

60a jaro

Kalendaro

Ni komencas je la 19a horo.

Kie? / Hvor? – vd. la lastan paĝon / *se siste side.*

Lundon la 2an de aprilo (semajno / uke 14) – *mandag*

Neformala kunveno, pro baldaŭa pasko *Uformelt møte, da det snart er påske.*

Lundon la 16an de aprilo (semajno / uke 16) – *mandag*

ABB: Ĉu fanatikulo aŭ nur frenezulo?
Kiel eviti similajn teroratencojn est-
ontece? + Eksterordinara ĝenerala
kunveno pro la prokrastitaj elektoj.

ABB: *fanatisk eller bare forvirret?*
Hvordan unngå at noe slikt skjer igjen?
+ Ekstraordinær generalforsamling for
å foreta de utsatte valgene.

Lundon la 7an de majo (semajno / uke 19 – *mandag*

Bjørn Øyen somerumis en Danlando.
Li rakontos pri siaj vizitoj al Christi-
ania, la Martinus-centro kaj alio.

*Bjørn Øyen tilbrakte noen sommeruker
i Danmark. Han forteller om sine
besøk på Christiania, Martinus-
centeret m.m.*

Lundon la 21an de majo (semajno / uke 21) – *mandag*

"Falsaj amikoj" kaj aliaj lingvaj fuŝoj
en la E-gazetaro. (Daŭrigo de la kun-
veno en marto.)

*"Falske venner" og andre språklige
ulykker i Esperanto-tidsskrifter (Fort-
settelse fra møtet i mars.)*

Lundon la 4an de junio (semajno / uke 23) – *mandag*

La jubilea kampanjo. Kiel altiri
ĵurnalistojn ĵaŭdon 26. julio?

*Jubileumskampanjen: hvordan få opp-
merksomhet fra journalister torsdag
26. juli?*

Lundon la 18an de junio (semajno / uke 25) – *mandag*

Ni sidos ekstere surtrotuare kaj al-
tiros la atenton de preterpasantaj
najbaroj per tabulo sur kiu ni
kolektos multlingvajn tradukojn de
"Bonan tagon" aŭ alia simpla frazo.

*Vi setter oss ute på fortuet med en
arktavle, snakker med forbipasserende
naboer og samler på oversettelser av
"God dag" eller noe annet enkelt til
alle Sinsens språk.*

OKAZIS

6. februaro. **La informkampanjo**

Ni venis malmultaj sed ni elpensis kelkajn taŭgajn tekstojn por la kampanjaj informiloj.

23. februaro. **Interretejoj.**

La anoncita prezento de Esperantaj retejoj tre plivigiĝis kiam alvenis kvar gejunuloj (el kvar landoj) survoje al junulara renkontiĝo en Tromsø. Ili povis diskuti pri la mastrumado de retejoj el propra sperto.

19 marto. **Pepita 80-jara.**

Lingvaj fuŝoj en Esperanto-periodaĵoj

Otto Prytz faris paroladon rakontante el la multjara aktivado de nia prezidinto Pepita de Caspary en Esperantaj medioj, kaj pluraj donacoj transdoniĝis. Post la festmanĝo Douglas Draper prezentis plurajn kolektojn de fuŝaj (kaj ofte amuzaj) miselektitaj vortoj en E-tekstoj.

DD

Jubile-jara informkampanjo

Jubileumsåret 2012 – info-kampanje

Por la 125-jara jubileo de Esperanto oni planis 125-partan interretan kurson por la 125 tagoj antaŭ la jubilea tago la 26an de julio. Bedaŭrinde tiu kurso ne pretiĝis ĝustatempe, sed anstataŭe Hilde Dahlberg (Mo i Rana) verkas norvegan 125-tagan kurseton ĉe *Twitter* (en Esperanto Pepservo? Kvivito?), kie mesaĝoj enhavu maksimume 140 literojn (kaj interspacojn). Ĉu alian lingvon oni povas lerni per unu minuto tage?! La kurso komenciĝis la pasintan ĵaŭdon, la 23an de marto.

Por informi pri tiu kurso, pri la jubileo kaj pri Esperanto ĝenerale ni starigis novan interretejon ĉe esperanto125.com.

"Ni" – tio estas la norvega jubilea teamo sub gvido de Mario Machlik (Tromsø), la norvega kontaktulo. Do nia jubilea kampanjo tutlandiĝis.

→ la lasta paĝo

I anledning esperantos 125-års jubileum var det planlagt et nettkurs i 125 små deler for de 125 dagene fram til jubileumsdagen 26. juli. Dessverre ble ikke dette kurset ferdig i tide, men til erstatning her i Norge er Hilde Dahlberg (Mo i Rana) i gang med å lage et 125-dagers kurs på Twitter (hvor ingen melding skal være på mer enn 140 bokstaver (med mellomrom)). Finnes det noe annet språk som kan læres på 1 minutt daglig?! Kurset kom i gang forrige torsdag, 23. mars.

For å fortelle om dette kurset, om jubileet og om esperanto generelt har vi laget et nytt nettsted: esperanto125.com.

"Vi" – det er den norske jubileumsgruppen, ledet av Mario Machlik (Tromsø), som er den norske kontaktpersonen. Kampanjen vår er altså blitt landsomfattende!. → siste side

Jarkunveno / Årsmøte, lundon / *mandag* 5. marto

El la protokolo

3. Jarraporto 2011:

Ni aprobis la dissenditan jarraporton, kun kelkaj korektetoj kaj aldonajetoj:

La alineoj pri radio kaj televido (sub "Lokaj amaskomunikiloj") estu jene:

En radio elsendiĝis:

en NRK, P1 *Her og nå* redaktita intervjuo farita kun Otto Prytz okaze de la jubileo de NEL, 27. januaro. (5. min.).

en Radio Migrapolis intervjuo kun Kristoffer Haug, Elisabeth Evje, Douwe Beerda kaj Leif Arne Storset (ĉ 5 min.). Sendita du fojojn en februaro + du ripetoj.

En televido

dum intervjuo en *TV2-nyhetene* 10. februaro Astrid Mansrud menciis sian Esperanto-agadon kaj montris kelkajn afiŝojn.

Sub "Interna agado":

La ŝtata subvencio estis 1 440 kr kaj la gajno pro vendado de manĝaĵo 1510 kr.

Sub "klubprogramoj" :

La februaran programon pri la nacia tago de la sameoj enkondukis Cato Haugen kaj la aprilan pri akompanado de blinduloj enkondukis Otto Prytz.

La junia gasto, Vladislav Hasala, venis el Ĉeĥio.

Ĝis nun ne pagis pliaj membroj por 2011, do la membronombro restas 63.

4. Jarkalkulo 2011:

La kasisto, Harald Rygg, prezentis la jarkalkulon.

En noto 2: 2010 → 2011.

Ni trovis ke la unua linio sub "Elspezoj": Libroaĉetado 2669 (2011) 2772 (2010) elfalis en la redaktita versio, kiu estis dissenda retroŝte.

Kun tiuj korektoj ni aprobis la jarkalkulon, kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

5. Ne estis **ricevitaj proponoj**.

6. **Elektoj**.

La elekta komisiono ne havis proponon por prezenti.

Ni prokrastis la elektojn ĝis eksterordinara ĝenerala kunveno lundon la 16an de aprilo.

Ĉar ne eblis fari la elektojn, devas funkcii plu la ĝisnunaj estraro kaj aliaj postenuloj.

DD

Helpu disdoni kartetojn *Vær med og spre info-kort*

Por atentigi pri la nova TTTejo (interretejo) ni produktis malgrandajn kartojn, kiujn ni enmanigu al homoj kun kiuj ni interparolas, aŭ lasu en kunvenejoj kaj sur afiŝtabuloj. Ni sendas po 1-2 kun *Norvega Esperantisto* n-ro 2, kiun vi ricevos post kelkaj tagoj. Vi povos ankaŭ mendi pliajn en nia oficejo.

Ni baldaŭ povos oferti ankaŭ flugfoliojn kaj afiŝojn.

For å gjøre oppmersom på de nye nettsidene har vi fått laget små kort, som man kan gi til folk man komme i snakk med, eller legge igjen på møtesteder eller sette på oppslagstavler. Vi sender med Norvega Esperantisto nr 2, som dessverre er forsinket, men den kommer om noen dager. Du kan også bestille flere fra kontoret.

Vi kommer snart også med flygeblad og plakater.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Meddommer?

Spørsmål fra Oslo kommune :

"Tror du at det finnes medlemmer hos dere som kan tenke seg å være meddommer? [..] Vi vil sette stor pris på om du videreformidler dette til deres medlemmer."

Fra veiledningen: Man må være 21–69 år 31.12.2012, bosatt i kommunen. Man velges for en 4-års periode og kan bli innkalt 1-2 ganger i året for en sak som varer 1-3 dager. Godtgjøres med 250 kr dagen. Mer info på kontoret vårt.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/Forbundet 0533 05 22870).